

La NASKa Fasko

Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe la Universitato de Viktorio

mardon, la 1-an de Julio, 2014 • numero du

Kio okazos hodiaŭ?

★ 9 atm – 12:30 ptm:
Kursoj



★ 3:00 – 4:00 ptm:
Student Union Building
Upper Lounge

Liĉjo gvidos traduk-rondon. Li prezentos anglalingvan tekston, kaj oni kune laboros por traduki ĝin en Esperanton.

★ 6:00/7:30 ptm – malfrue:
Kunvenu ekster la loĝejo

Du grupoj iros per buso al la urbocentro de Viktorio por festi Kanado-Tagon. La artfajraĵoj komenciĝos je 10:20 ptm, do ni revenos malfrue – verŝajne ĉirkaŭ noktomezo. Kompreneble, vi rajtas reveni pli frue, se vi volas. Nepre kunportu taŭgajn monerojn por la busvojaĝo.



La NASKa Fasko

Redaktejo: Ĉambro 203

<nask.esperanto@gmail.com>

La NASKa Fasko estas ĉiutaga ĵurnalo de la kursaro.

Se vi volas kontribui mallongan artikolon, foton, ŝercon, bildstrion, leteron, poemon, am-leteron, ktp. bonvolu alporti ĝin al la redaktejo en ĉambro 203, aŭ – eĉ pli bone – sendu ĝin al <nask.esperanto@gmail.com>.

Ekskurso al la urbocentro de Viktorio


Hodiaŭ oni festas Kanado-Tagon per muziko, manĝado, kaj – post sunsubiro – artfajraĵoj. Du grupoj iros buse al la urbocentro de Viktorio por ĝui la festadon. La prezo por unudirekta veturo estas \$2.50. Necesas pagi la ĝustan sumon, do nepre portu taŭgajn monerojn. La artfajraĵoj komenciĝos je 10:20 ptm, do ni revenos malfrue – ĉirkaŭ noktomezo.

La vetero eble estos malvarmeta, do kunportu puloveron se vi havas, kaj eble ankaŭ tukon por komforte sidi sur la herbo.

Se vi volas iri frue, Lottie gvidos grupon je 6:00 ptm. Ŝi atendos vin en la korto ekster nia loĝejo.

Hoss gvidos alian grupon je 7:30 ptm, de la sama loko.

Se vi decidis reveni frue, vi povos trafi buson #4 ĉe unu el pluraj haltejoj en la strato Douglas. Kaj se vi restos post la 10-a horo, la buso haltos ĉe speciala haltejo inter la stratoj Yates kaj View. (Vidu la mapon dekstre.)



Sciigoj pri lavmaŝinoj kaj vifio

Lavmaŝinoj kaj sekigiloj troviĝas en la plej malsupra etaĝo de nia loĝejo. Serĉu ĉambrom n-ro 008.

La maŝinoj uzas specialajn kartojn, kiujn oni povas aĉeti kontraŭ \$5 ĉe la akceptejo (la loko kie vi ricevis ŝlosilojn). Se vi preferas ne aĉeti karton kaj lesivon, Julie (en ĉambro #210) konsentis pruntedoni sian propran karton, kaj Jarlo (en ĉambro #212) volonte dividas kun vi sian lesivon.



Ĉu vi

uzas
porteblan
komputilon?

Hodiaŭ la universitato ŝanĝos la pasvorton de sia sendrata reto. Bedaŭrinde, la nova pasvorto ne estas havebla ĝuste nun (je la horo de presado) do ne eblas publikigi ĝin en la hodiaŭa Fasko.

Se vi ne volas atendi ĝis merkredo, bonvolu iri al la akceptejo kaj petu novan pasvorton de la deĵorantoj tie.



Salutoj de kelkaj membroj el la NASK-a skipo

Usui Hiroyuki

Mi memoras, ke dum la 1980-aj jaroj NASK estis aparte populara inter japanaj esperantistoj. Tamen mi neniam havis okazon partopreni en tiu ĉi legenda aranĝo.



Jam en la fino de tiu jardeko mi komencis instrui Esperanton, sed vere intense/celkonscie mi komencis nur lastatempe. En Marto 2012 mi “eknestis” en Pekino kaj en Junio 2013 lanĉis du kursojn por revigligi la lokan movadon. Komence mi havis preskaŭ 40 kursanojn! Unu jaron post la lanĉo, mi ankoraŭ havas pli ol 10 lernantojn. Mi pensas, ke jen kontentiga rezulto.

Ĉiukaze, ĉi tie en Viktorio mi provos rekrei la etoson de miaj kursoj en Pekino. Mi intencas:

- igi vin prepari paroladeton/artikoleon laŭ diversaj temoj (ekz. pri viaj esperantistiĝo, hejmloko, Esperanto-societo ktp);
- prezenti facetojn de la Esperanto-kulturo (ekz. “krokodili”) kaj kelkajn gravajn kultur-kreintojn (ne de A al Z, sed de Z[amenhof] al A[uld]);
- igi vin kanti ĉinajn kaj japanajn kantojn tradukitajn en Esperanto;
- laŭeble multe uzi sonregistraĵojn kaj filmetojn;
- esti ... amuza instruisto.

Mi kutimas enkonduki poemojn en mian klasĉambron. Iuj inter vi eble ne ŝatas poemojn. Sed iu pekina veterana esperantisto, kiu de tempo al tempo venas “spioni” miajn kursojn, konfesis al mi: “mi ne estas homo, kiu komprenas poemojn. Sed partopreninte vian lecionon, mi komprenis, kion tiu poemo diras.” Jen alia kontentiga rezulto. Espereble sama miraklo okazos ankaŭ al vi!

USUI Hiroyuki/JIUIJING Yuzhi*

*mia nomo en la ĉina prononco...tute malsama, ĉu ne?

Jenja BONDELID

Kun granda ĝojo mi anticipas la ĉinajn NASK-programon, kaj nian kunlaboron! Mi unue partoprenis ĉe NASK kiel postbaza studento, do mi aparte antaŭgvas la sperton nun instrui tiun saman nivelon post preskaŭ du jardekoj. Mi daŭre venadis al NASK dum pluraj pli-malpli sinsekvaj jaroj por ĝui ankaŭ la mezan kaj superan nivelojn sub la instruado de diversaj tre bonaj instruistoj. Dume, mi sekvis universitatan studprogramon pri Esperanto-instruado per la gvidado de Duncan CHARTERS ĉe la kolegio Principia en Ilinojso, Usono, kaj diplomiĝis pri tio en 1999. Mi renovigis



mian instrukapablon sub la gvidado de Liĉjo MILLER ĉe NASK en Raleigh pasintjare.

Dum la pasintaj jaroj mia Esperanta agado temis multe pri aktorado, kaj teatre kaj filme. Mi partoprenis la rolantaron de la instrufilmo *Pasporto al la Tuta Mondo*, voĉaktoris en filmoj de Christopher MIHM, kaj rolis kiel germana Esperanto-instruisto en *The Language Archive* kiun verkis Julia CHO. Plej lastatempe mi starigis Kino-Teatro-Festivalon cele akirigon de scenarta sperto al esperantuloj, kaj de esperantlingva sperto al aktoroj kaj aliaj spertaj scenartistoj kaj teknikistoj. La unua okazigo de la festivalo pasintaprile ja montris, ke teatrumado tre helpas la lingvoakiradon, kaj mi planas utiligi tion tre profite al la postbazuloj.

Do, anticipu aktivigi en mia klasĉambro! Ni estos kunaj dum malmultaj tagoj kaj vi ne sidadu aŭskulti min prelegi pri gramatikeroj dum horoj! Mi ja ŝategas prelegi pri la multaj al-mi-interesegaj gramatikeroj, sed mi planas fari tion malpli ofte ol mia emo, por doni al la studentoj pli da okazo ekzerci kaj plibonigi sian parol- kaj komprenkapablon. Estas multaj manieroj per kiuj oni povas plibonigi sian propran leg- kaj skribkapablon aŭtodidakte ekster NASK, do ni iom pli okupiĝos pri akirado de la kuraĝo kaj scipovo utiligi la lingvon en vizaĝ-al-vizaĝa medio.

Nia klasĉambro estu loko kie oni sekure provu novajn aferojn, subtenante unu la alian, kaj komprenante ke preskaŭ ĉiu esperantulo estas iama komencanto.

Kuraĝo, kaj ĝuu!

“Mi parolas Esperanton.”

de James NUGENT

Lastan someron mi verkis libron. Ĝi estas pri NASK-2013. La mallonga libro estas en la angla lingvo sed estas ĉarma rakonto pri la Esperanta komunumo.

La nomo de la libro estas *I speak Esperanto*. Ĝi estos en elektronika formo ĉe Amazon.com en Aŭgusto, kaj ĝi estos senpaga!

